

EKO plu komunikas!

EKO 2020-1 sendita el Nelson, Suda Insulo de Nov-Zelando, la 8an de januaro.

Al: La Komitato, konsilio, Landaj Asocioj, iuj AMintoj kaj multaj pliaj

Sukcese okazis la 7a Afrika Kongreso de Esperanto

Tiu kongreso okazis en Buĵumburo, la ĉefurbo de Burundo, inter la 21a kaj la 27a de dec. 2019. Ĝi altiris 166 aliĝintojn el 14 landoj. Fine alvenis 135 partoprenintoj el 9 landoj : Burundo, DR Kongo, Tanzanio, Kamerunio, Madagaskaro, Togolando, Sviso, Belgio kaj Italio. Kadre de la kongreso okazis la 61-a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO), pri kiu ni atendas ricevi raporton. Okazis sesio de lingvaj ekzamenoj laŭ la ILEI/UEA sistemo. Okazis provlecionoj kadre de Eo-Instruista Trejnado.

Jen pecoj el raporto de loka organizinto. 'La Afrika Kongreso de Esperanto estis bona okazo renkontiĝi kun geesperantistoj el diversaj partoj de la mondo, kaj tio ebligis al la partoprenintoj interŝanĝi spertojn.' Al la partoprenintoj li skribis: 'Estis vere granda ĝojo por ni esti kun vi, via partopreno en la kongreso estis valora kaj dankinda, ni lernis multon de vi. La movado de Esperanto en Burundo ĉiam memoros vian gravan viziton en nia lando, ni ne forgesos vian kontribuon, vi vere grave valoris dum via restado en Burundo okaze de la 7a AKE. Estis plezuro por ni kune kongresumi'

Pluiras la raporto: 'La kongreso enhavis multajn programerojn, en kiuj ni profitis lerni, sperti de unu la alia tra la programeraĵoj interŝanĝoj. Ni diskutis, ni babilis, ni amikiĝis kaj konis unu la aliajn. La 25an de decembro estis tuttaga ekskurso, ni vojaĝis kaj vizitis diversajn lokojn, inter aliajn, la centron de Esperanto en Burundo. La ekskurso realiĝis en bela etoso kun kantoj, fotadoj, ĝojo, ...

Kelkaj samideanoj planis partopreni la 7an AKE kun ni, sed ne povis pro diversaj kialoj. Kelkaj el ili sendis al ni salutmesaĝojn el diversaj partoj de la mondo. Ni kun ĝojo ricevis la mesaĝojn amikajn kaj varmajn. Ni amas vin kaj same bondeziras al vi sukceson. Mi esperas ke iam, ni havos okazon plie renkonti unu la aliajn en movadaj eventoj.



Samideane,
Gilbert Ndiokubwayo. Bujumbura.

Sukcesa jaro por Fondaĵo Canuto en 2019

Pasis la novjaro, do jam tempo resumi la laboron de Fondaĵo Canuto por la kalendara jaro 2019.

Sume en 2019, FC subtenis 482 membrigojn el 74 landoj. El tiuj 5 bedaŭrinde forpasis en la jaro, do ne aperas en la kalkuloj.

Afriko (subsahara): Angolo 2, Benino 23, Burkino 1, Burundo 14, Centrafrika Resp. 1, Ĉado 3, Eburbordo 1, Etiopio 2, Gabono 1, Ganao 3, Kamerunio 4, Kenjo 1, Komoroj 2, Kongo DR 20, Kongo PR 3. Madagaskaro 6, Malio 2, Niĝero 2, Niĝerio 2, Ruando 2, Senegalo 11, Sud-Afriko 2, Tanzanio 7, Togolando 17. Sume: 132 en 24 landoj.

Ameriko: Argentino 5, Bolivio 2, Brazilo 38, Ĉilio 2, Gvatemalo 2, Honduro 1, Kolombio 6, Kostariko 1, Kubo 24, Meksiko 17, Nikaragvo 2, Peruo 4, Trinidado 1, Venezuelo 1. Sume: 107 en 14 landoj.

Azio: Ĉinio 18, Filipinoj 1, Hinda Unio (Barato) 5, Indonezio 9, Irano 13, Kamboĝo 2, Kazaĥio 3, Mongolio 9, Nepalo 13, Orienta Timoro 4, Pakistano 20, Taĝikio 1, Tajlando 1, Uzbekio 6. Vjetnamio 16. Sume: 121 en 15 landoj.

Eŭropo: Albanio 11, Belorusio 2, Bosnio-Hercegovino 12, Bulgario 15, Francio 2, Germanio 1, Makedonio 2, Nederlando 1, Pollando 1, Rumanio 14, Rusio 8, Serbio 8, Slovenio 1, Ukrainio 12. Sume: 91 en 14 landoj.

MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko): Alĝerio 3, Armenio 6, Kartvelio 2, Maroko 3, Palestino 1, Tunizio 3, Turkio 9. Sumo: 27 en 7 landoj.

Ni korege dankas al la multaj donacintoj al FC tra la jaro, kiu permesis tiun bonan rezulton, kaj eĉ kreis rezervon por 2020. Pliaj donacoj al Fondaĵo Canuto ĉiam bonvenas!

Esperanto en ĉinaj lernejoj

Inter la 16-a kaj 20-a de decembro okazis la 7-a Esperanto-Semajno de la elementa lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan de la provinco Shanxi, norda Ĉinio. Temis pri "ĉina spirito, monda rigardo". Dum unu semajno okazis diversaj eventoj pri Esperanto por pli ol 1 500 lernantoj, instruistoj kaj gepatroj.

Por pli da detaloj kun fotoj :

http://www.espero.com.cn/2019-12/27/content_75555532.htm

Inter la 29-a de novembro kaj la 1-a de decembro 2019, la novaj studentoj de la fakultato pri Esperanto de Zaozhuang-a Universitato alvenis en Pekino kaj partoprenis Junularan Forumon de Esperanto.

http://www.espero.com.cn/2019-12/05/content_75482084.htm

La decembra Eŭropa Bulteno kaj 'La mondo de Esperanto'

Pri la Eŭropa Bulteno legu: <https://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

El la enhavo:

1. Novjaraj bondeziroj de la redaktoro
2. Alvoko al la assembleanoj de EEU kaj Landaj Eo-asocioj en Europunio
3. Zamenhotago en Vieno
4. 100 jaroj de Litova Eo-Asocio
5. Reprezentanto de UEA parolas dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO
6. Praktikado de Esperanto je diversaj niveloj
7. Internacia grupo por reta kurso formiĝas

Kun la nova jaro venas nova numero de *Le Monde de l'espéranto*. 32 paĝoj, parte en la franca, parte en Esperanto.

<https://esperanto-france.org/LME-604>

Ĉefaj temoj:

Dosiero : 2019, Année Internationale des langues autochtones /

Dosiero : 2019, Internacia jaro de Indiĝenaj lingvoj

Les jeunes Indiens veulent apprendre l'espéranto / Junaj baratanoj volas lerni Esperanton

Forpasis Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof

kaj la kutimaj rubrikoj : Unesko, prelegvojaĝoj, legindaj libroj, raportoj pri kulturaj aranĝoj, kulturo, ktp.



Vortoj: 850

Por la fermaj informoj, legu ajnan komunikon el 2019.